
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 1 (838) 2003 ✪



*La interno de la preĝejo en Rimini, kie troviĝas indikita en la duonarko ankaŭ en esperanto: Vi estos miaj atestantoj. Fotis B.R. en 1997.*

## LA ĈIJARA KONGRESURBO: RIMINI

### EN ĈI TIU NUMERO: IOM DA TEOLOGIO, DA BIBLIO, DA KRISTANA SPERTO KAJ DA ESPERANTA VIVO POR BONE KOMENCI LA NOVAN JARON

# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Jacques TUINDER
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
🖳 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
🖳 j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
🖳 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

# DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

**Redaktoro:** Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21;
🖳 diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:**
Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+4832 2650038; 🖳 esperanto@hejme.e-tools.pl


## ENHAVTABELO


3 Lina Sandell
4 Ĉu mi kulpas? — afero por pripensi
6 La reĝo kiu servas
7 Kara frato en Kristo — la atesto pri „vera Kristanismo"
8 Kiel Dio savis min
9 Biblia rakonto reverkita — La kaŝa vizito
11 La du instruistoj
12 Plugu al vi plugotaĵon...
14 Liberaj evangeliaj komunumoj
16 La kulpa filo — kristana fikcio
17 Maria kaj Marta
18 Al lingva demokratio!
21 Novjara mesaĝo de via Prezidanto
24 Apud la tombejo de sankta apostolo Andreo — kaj inter ili kutimaj eroj...


## REDAKTORAJ VORTOJ

*Estos militoj kaj bruoj de militoj.*

Kien iras ĉi tiu nova jaro? Ĉu la ĉina jaro de la kaprino estos malbona? Eĉ la financistoj ĝis nun ne scias kaj hezitas investi. Eble dum la tempo inter la verkado de ĉi tiu teksto, kaj la ricevo de la revuo viaflanke multaj aferoj okazos jam.

Tamen, en ĉio, mi kredas ke nia Dio estas la Sinjoro de la historio, ke malgraŭ la faroj de la homoj, li troviĝas en nia historio kaj akompanas nin. Li decidis veni kaj vivi kun ni, ĝis la morto. Li releviĝis por ke ni havu esperon.

Kiel mi jam diris al vi, en mia lando komenciĝis la „Jaro de la Biblio". Mi esperas forte ke ĝi estos por ĉiuj jaro de savo kaj ne jaro de pereo, ke vivo supervenkos morton.

En ĉi tiu numero, ni rigardos al la kristana vivo, al la Biblio, kaj al la mesaĝo de Dio. Mi daŭre atendas de vi kontribuojn, rilate al la Biblio kaj al via vivo de fido, ankaŭ rilate al la homa vivo sur la tero, al la esperanta vivo.

Mi sendas al vi ĉiuj, kiel redaktoro, plej bonajn dezirojn, en la amo de nia Sinjoro.

Philippe COUSSON



# LINA SANDELL

Lina SANDELL naskiĝis en Fröderyd la 3an de oktobro 1832. Ŝia patro, la distrikta preposto Jonas SANDELL, tiea paroĥestro 1829–1858, kaj ŝia patrino Fredrika (naskita ENGSTRAND), filino de preposto, naskiĝis en Lenhovda. Post infanaĝo, karakterizita de multaj malsanoj ŝi translokiĝis al Stockholm por agadi kiel eldoneja ĉefo ĉe EFS (*Evangeliska Fosterlandsstiftelsen*, Evangelia Fondaĵo Svedlanda) ekde 1861. Ŝi estis la unua virino en Svedio sur ĉefa posteno. Ŝia precipa laboro tamen restis la propra verkista agado.

Ŝiaj kantoj, inter kiuj kelkaj tradukoj aŭ adaptoj de anglaj originaloj, vaste disvastiĝis kaj multe populariĝis. Ŝiaj plej konataj kantoj estas preskaŭ klasikaj „Tiel ne sekuras io kiel infanar' de Dio", (*Tryggare kan ingen vara*), n-ro 500 en Adoru, kaj „Tagon nur, momenton nur ni prenas", (*Blott ett en dag, ett ögonblick i sänder*), n-ro 495. Krome „Flugilojn viajn tenu, Jesuo, super mi", (*Bred dina vida vingar*), n-ro 166.

La muzeo de Fröderyd estas 300-jara domo, kie estas konversataj la studejo kaj la kontoro de la preposto SANDELL. Ankaŭ ekzemplero de Gustavo Adolfo epoka biblio (komence de 17-jara jarcento) troviĝas tie. En la ĉambro de Lina SANDELL troviĝas kelkaj el ŝiaj poemoj kaj ŝia portreto. En la parko apud la muzeo staras la 300-jara frakseno, sub kiu estas lokita la statuo de Lina SANDELL, fare de Axel WENNERBERG. Oni rakontas, ke Lina verkis „Tiel ne sekuras io kiel infanar' de Dio" sidante sur branĉo de tiu arbo.

Granda nombro da kantoj estas tradukitaj en danan, norvegan kaj finnan lingvojn. Multaj kantoj enestas en la revuoj *Barnens tidning* (La infana gazeto, 1886–1881) kaj *Barnens vän* (La amiko de infanoj, 1899–1901). En nia sveda himnaro enestas 29 kantoj de Lina SANDELL. Ŝi edziniĝis la 21an de majo 1867 al Carl Oscar BERG — parlamentano, kontraŭalkohola oratoro, laiko predikanto, ĉefkonsulo de Rumanio, socie agema persono. Li aĉetis la malnovan sinagogon en Stockholm kaj malfermis tie la unuan maristan hejmon de nia lando. Li estis inter la eminentaj personoj, kiuj aŭdiencis ĉe la reĝo Oscar II por kondamnigi la aŭtoron August STRINDBERG pro ties libro „Geedziĝo" en 1884. Post la unua tago de la sekvanta proceso, Oscar BERG vizitis August STRINDBERG en lia hejmo kune kun ĵurnalisto. Tiuokaze li deklaris, ke li envere ne ŝatas la akuzon, ke li ne kredas je la dieco de Kristo nek je la doktrino pri la infero kaj ke li havas unu konvikiĝon privatan kaj alian konvenan por liaj predikoj antaŭ grandaj homamasoj en la preĝejo de Blasieholmen, sanktejo de la Evangelia Fondaĵo Svedlanda en Stockholm. STRINDBERG karikaturas BERG en sia dramo Spöksonaten (Sonato de fantomoj), en kiu la mortinta ĉefkonsulo (= Oscar BERG) en la tago de sia entombiĝo kontrolas, starante sur la veranda ŝtuparo de la konsula loĝejo, ke la konsuleja flago estas laŭrite hisita.

Dum la jaroj 1867–1877 la geedzoj loĝis ĉe Drottninggatan 82 kaj dum la jaroj 1877–1903 ĉe Skeppsbron 3. Lina SANDELL-BERG naskis filinon, kiu mortis ĉe la naskiĝo. La geedzoj ne havis aliajn infanojn. Lina SANDELL verkis ĉirkaŭ 1700 kristanajn poemojn, eldonis 144 librojn kaj

redaktis plurajn revuojn, inter kiuj Barnens vän kaj Korsblomman (la Krucfloro) estas la plej konataj. Ŝiaj kantoj estas kantataj plurlingve, ankaŭ esperante, tiel en la katolika kiel en la protestanta eklezioj.

En 1894 ŝi estis devigata travivi la bankroton de sia edzo (je preskaŭ 970.000 kronoj) kaj lian enkarceriĝon dumonatan en la malliberejo Långholmen, pro mankhava librotenado de lia ĉefkontisto. Komponistoj kiel ekzemple Oscar AHNFELT, Gunnar WENNERBERG, Theodor SÖDERBERG, Per Ulrik STENHAMMAR kaj J.A. HULTMAN helpis igi la poemojn de Lina SANDELL konataj kaj popularaj.

La 27an de julio 1903 mortis Lina SANDELL. La funebra ceremonio okazis en la preĝejo de Solna la 31an julio je 19a horo. Miloj da homoj akompanis la funebran procesion. Ŝia tombŝtono estas nigra kun ora nomskribo kaj la teksto „Tiel ne sekuras io kiel infanar' de Dio". La memoro de Lina SANDELL estas ĉiujare ekde 1953 celebrata en Fröderyd je la tago de transfiguriĝo de Kristo. Tiun daton oni elektis ĉar ŝia patro faris sian inaŭguran predikon en la preĝejo de Fröderyd je tiu tago.

La norvega televido faris en 1981 la unuan filmon pri Lina SANDELL. La sveda radio dissendis programon pri ŝi dimanĉon la 30an de aprilo 1989, titolitan „Dimanĉa vespero en la Fröderyd de Lina SANDELL", produktitan de Stig TORNEHED, Växjö.

La materialon de tiu ĉi prelego mi ricevis de Stig TORNEHED dum lia prelegserio en julio 1994 okaze de la porpensiula kurso en la popolaltlernejo de Sankta Sigfrid. Ebbe VILBORG faris la tradukon.

Arne LUNDKVIST

# ĈU MI KULPAS?

**Iu e-poŝto — afero por pripensi...**

26.04.2002 — en germana urbo Erfurt la 19-jara lernanto, forĵetita el lernejo mortigas el pafilo 14 instruistojn, 2 lernantinojn, policiston kaj fine sin mem. La tuta mondo demandas KIAL?

Konfesu al si, kion vi plej ŝatas rigardi en kino, kion vi plej ŝatas rigardi en TV, per kiuj ludiloj vi ludas en komputilo? Ĉu vi ŝatas perforton, sangon, mortigadon?

Ne? Kaj viaj proksimuloj, parencoj, konatuloj? Ĉu vi iam jam diskutis pri tiuj problemoj, ĉu vi starigis tiujn demandojn al vi aŭ al aliaj, ĉu tio fakte estas tiel senkulpa, „kvazaŭa"?

Post la terorista katastrofo en Usono la 11an de septembro 2001, filino de Billy GRAHAM en TV-intervjuo je la demando: „Kiel Dio povus permesi je tio?" respondis: „Mi estas konvinkita, ke Dio estas profunde malĝoja pro tiu fakto, same kiel ni, sed de multaj jaroj ni diras al Dio, ke Li foriru el niaj lernejoj, el niaj registaroj, el nia vivo. Ĉar Li estas ĝentila, mi estas konvinkita, ke Li silente retiriĝis. Kiel ni povas atendi, ke Dio benos nin kaj savos nin, kiam ni postulas, ke Li trankvile lasu nin?

Mi pensas, ke ĉio komenciĝis kiam Madeline MURRAY O'HARE (ŝi estis murdita, antaŭ nelonge oni trovis ŝian kadavron) plendis pri la preĝado en niaj lernejoj".

Kaj ni respondis OK.

Poste iu diris, ke estus pli bone se en lernejoj oni ne legus Biblion... la Biblion, kiu diras: ne mortigu, ne ŝtelu, amu sian amikon kiel sin mem.

Kaj ni respondis OK.



Poste D-ro Beniamin SPOCK diris, ke ni ne manfrapetu niajn infanojn kiam ili malbone kondutas, ĉar iliaj malgrandaj personecoj deformiĝas kaj ni povus detrui en ili respekton al si mem (filo de D-ro SPOCK memmortigis sin).

Kaj ni konstatis, ke eksperto certe scias kion li diras kaj tial ni diris OK.

Poste iu diris, ke estus pli bone, se instruistoj edukistoj ne punu niajn infanojn kiam ili ne bone kondutas. Direktoroj de lernejoj diris, ke estus pli bone ke neniu el laborantoj de lernejoj tuŝu la lernantojn, kiam ili malbone kondutas, ĉar lernejoj ne bezonas malbonan opinion, kaj ne bezonas juĝprocesojn. (Estas granda diferenco inter puno, tuŝado, batado, humiligado, piedbato ktp).

Kaj ni respondis OK.

Poste iu diris: ni permesu al niaj filinoj je abortigo, se ili tion volas. Eĉ ili ne bezonus informi pri tio siajn gepatrojn

Kaj ni respondis OK.

Poste iu saĝulo el lerneja konsilantaro diris: Ĉar knaboj estos knaboj, do ili farados „tion", ni donu al ili tiom da kondomoj, kiom ili volos, por ke ili ĝuu tiom da agrablaĵo kiom ili volas, kaj ni ne bezonus diri al iliaj gepatroj, ke knaboj ricevas ilin en lernejo.

Kaj ni respondis OK.

Poste iuj el niaj elektitaj, altaj ŝtatoficistoj diris: tio ne gravas kion ni faras private, ĝis kiam ni plenumas niajn taskojn. Konsentinte kun ili, ni diris: ne interesas min tio kion iu, ankaŭ prezidento, faras, ĝis kiam mi havas laboron kaj ekonomie estas bone.

Poste iu diris: ni presu la ĵurnalojn kun nudaj virinoj kaj nomumu ni tion admiro por beleco de virina korpo.

Kaj ni respondis OK.

Poste iu alia iris unu paŝon pluen kun tiu admiro kaj publikigis la fotojn de nudaj infanoj, kaj faris unu paŝon ankoraŭ plu prezentante la fotojn en interreto.

Kaj ni respondis OK. Ili havas rajton libere prezenti siajn inklinojn. Poste distra industrio komencis produktadon de TV-spektakloj kaj filmoj promociantaj perforton, profanadon kaj malpermesitan sekson. Oni komencis surbendigadon de muziko stimulanta al perforto, narkotaĵoj, mortigado, memmortigado kaj satanisman muzikon.

Ni konstatis, ke tio estas nur distraĵo, ne havas iajn malbonajn efikojn, neniu traktis tion serioze. Do ni iras antaŭen.

Nun ni demandas nin, kial niaj infanoj ne havas konsciencon, kial ili ne scias kio estas bona kaj kio malbona, kial ne malĝojigas ilin mortigado de fremduloj, kolegoj el la klaso kaj memmortigado? Verŝajne, se ni pensus pri tio longe kaj profunde ni povus trovi respondon. Mi pensas, ke tio havas multe da komuneco kun tio kion ni semis:

NI RIKOLTAS TION, KION NI SEMIS!

— „Kara Dio, kial Vi ne savis tiujn junajn personojn, kiuj estis mortigitaj en sia lernejo?" — skribis sincere klopodanta lernanto.

— „Kara klopodanta lernanto, mi ne havas konstitucian permeson agi en la lernejoj

sincere via Dio".

Mirige, kiel simple estas por homoj forĵeti Dion, kaj poste miri, kial mondo iras al infero. Mirinde, kiel forte ni kredas je tio, kion oni skribas en la gazetoj, kaj ni dubas en tio kion diras la Biblio.

Estas mirinde, ke ĉiu volas iri ĉielen, kondiĉe, ke ne devos kredi, pensi, diri, fari ion ajn pri kio parolas la Diaj Vortoj.

Estas mirinde, kiam iu povas diri: „Mi kredas je Dio" kaj postiras Satanon, kiu marĝene, ankaŭ kredas je Dio.

Estas mirinde kiel facile ni pritaksas, kaj ne volas esti pritaksataj.

Estas mirinde, ke vi povas elsendi per elektronika poŝto milojn da „humoraĵoj" kiuj disvastiĝas kiel fajrego, sed kiam vi sendas mesaĝojn ligitajn kun Dio, vi dufoje primeditos ĉu sendi ilin al aliaj.

Estas mirinde kiel informoj obscenaj, malhontaj, pikantaj kaj vulgaraj libere disvastiĝas en la spaco, sed publika diskutado pri Dio en lernejo, en laborejo estas subpremita.

Estas mirinde, kiel iu estas favora al Dio dimanĉe, kaj aliaj tagoj de semajno estas nevidebla kristano.

Vi ridas? Estas ridinde, kiam vi tralegos tiun informon — vi ne sendos ĝin al multaj personoj el via adresaro, ĉar vi ne estas konvinkita, je kio ili kredas, aŭ kion ili pensos pri vi, kiam ĝin ricevus?

Estas ridinde kiel forte interesas min tio, kion pensos pri mi aliaj, ol tio al kio vokas min Dio.

Kion vi pensas? — Transdonu tiun mesaĝon pluen (sendu aŭ kopiu), se vi opinias ke valoras. Se ne, simple forĵetu... Neniu sciiĝos pri tio. Sed, se vi forĵetos, ne staru flanke kaj ne plendu pli malbona stato de nia mondo!!!

elpoligis Stanisław MANDRAK

El „Parohaj informoj" (*Wiadomości parafialne*) de parohejo al sanktaj Stanislavo kaj Bonifacy en Świnoujście, Polando, la 7an de julio 2002

## LA REĜO KIU SERVAS

Ĉu ne estas malofte, ke ekzistas iu grava gvidanto, kiu ne nur regas, sed ankaŭ servas? La nuntempaj politikistoj, estroj de entreprenoj, kaj bedaŭrinde eĉ kelkaj gvidantoj de la eklezio kutime kondutas ne serve, sed MEMSERVE sen pensoj pri la bonfarto de la ordinaraj homoj, super kiuj ili regas.

Tamen Jesuo estas granda escepto al tiu „regulo". Li ne nur servis al la homoj de sia tempo, sed eĉ lasis sin krucumi por savi la tutan homaron de ĉiuj epokoj.

*Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto; same kiel la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj.* (Mateo 20:25-28).

Kiel nia mondo estus, se niaj grandaj regantoj havus la saman emon al servo, kiel Jesuo? Ĉu vi povas imagi, ke ili agus tiel arogante, kiel ili faras nun? George BUSH, ekzemple, lavante la piedojn de Vladimir PUTIN? Tony BLAIR aŭ Jacques CHIRAC kiel humilaj servistoj ĉe ŝtata bankedo? Eĉ la penso pri tio ŝajnas esti absurda. Sed ĝuste tiun sintenon de serveco havis Jesuo, samtempe estante Reĝo de reĝoj, la Mesio de Dio.

Kaj kiel pri ni? Ĉu ni emas servi aŭ esti servata? Konata ŝerco diras, ke ĉe la pordo al la ĉielo staras ŝildo kun la vortoj „Enirejo nur por servistoj". Ĉu ni eniros tra tiu ĉi pordo, aŭ ĉu ni serĉos alian, pli taŭgan por ni?

Paŭlo skribis: *Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo, kiu, estante en la formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio sed sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj; kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco* (Filipianoj 2:5-8).

Dankon al Dio pro nia servanta Reĝo kaj Savanto, kaj al li estu gloro por ĉiam kaj eterne. Amen.

Jerald VEIT

## KARA FRATO EN KRISTO

Jen mia atesto. Kion vi pensas pri tio? Mi pensas, ke vera Kristanismo povas ŝanĝi la koron de la homoj. Esperanto ne sufiĉas por sanĝi la societon. La Biblia Kristanismo sanĝas la vivon en la societo. Estas ĝojige, scii ke Jesuo vere amas min. Mi iros vidi Lin post la morto. Nenio estas pli agrabla ol scii, ke Jesuo havas la plej bonajn donacojn por ni. Li havas mirindajn celojn por ni. Nur Jesuo savis min. Kristanismo ne estas ĉiam ripeti la samajn preĝojn dum la kunvenoj. Kristanismo ne estas fari bonajn farojn por esti eble savota. Vera Kristano estas certa, ke li iros en la ĉielon. Vera Kristanismo, estas eldiri al Dio sian dankemon pro la savo en Kristo. Vera Kristanismo estas helpi la malfortulojn de la eklezio.

Jen kiel mi iĝis Kristano: Miaj gepatroj estas katolikaj. Mi kredis je Dio, sed mi ne pensis pri li. Miaj gepatroj disiĝis. Tiam mia fratino parolis pri Dio al mi. Ŝi diris al mi, ke Jesuo mortis pro miaj pekoj, kaj ke mi devis akcepti lian donacon, se mi volis esti kun li post mia morto. Tiam mi imagis min antaŭ Dio. Mi sciis, ke mi estas pekulo, kaj se li vere mortis por mi, kaj mi ne akceptis lian donacon, mi neniam estis pardonota de li. Tiam mi akceptis lian savon, kaj mi legis mian Biblion kaj baptiĝis en la rivereto. Mi estis certa pri mia savo. Mi estas certa, ke mi iros al la ĉielo. Mi havis alian ĉelon en mia vivo. Tiam mi ekiris al la kunvenoj de Kristanoj, kaj la sabatojn mi parolis pri Dio al la preterpasantoj, por ke ili estu savotaj. Tio okazis antaŭ 20 jaroj. Ĉu vi volas skribi vian ateston?

Mi lernis Esperanton, ĉar kiam mi iris en Rumanujon tieaj homoj diris al mi: „Mi ne scipovas la anglan". Mi pensis, ke mi povis lerni ambaŭ lingvojn: la anglan kaj Esperanton. Ĉiuj estas je la sama nivelo, sed la Angla lingvo estas facila nur por la anglalingvanoj. La malriĉuloj povas pli facile lerni Esperanton ol la anglan, pro ĝia reguleco. La lingvo estas taŭga rimedo por komprenado. Unue mi lernis Esperanton sola per libro. Poste mi baldaŭ lernis dum du jaroj Esperanton irante al la kursoj en Karloreĝo (Franclingve: Charleroi).

Kion vi pensas pri tio ? Mi antaŭdankas vin pro via respondo.

Mi provas evangelizi en Esperantujo. Mi pensas, ke estus bone se ekzistus grupo de Kristanoj en ĉiuj landoj. La Biblio devas ludi pli gravan rolon en la KELI. Kiel vi pensas, ke oni povas pli facile atingi por anonci la Evangelion. Dum la UK mi disdonacas paperojn pri la Evangelio. Mi petas, kion ili pensas pri Jesuo. Poste mi havas kontaktojn kun la Kristanoj, kiujn mi tiel ekkonis. Mi provas korespondi kun ili. Ĉu tio estas la bona metodo? Mi tre dankas vin pro via afabla respondo.

Amike,

Philippe DE VOS

## KIEL DIO SAVIS MIN

Antaŭ ol mi donis mian vivon al Kristo, mi vivis modestan vivon: mi neniam fumis kaj preskaŭ neniam drinkis bieron. Oni baptis min asperge, kiam mi havis nur 177 tagojn. Je dekkelka jaraĝo mi faris mallongtempan religian studon, kiu gvidis al mia konfirmacio kiel membro, kio finfine ebligis la privilegion partopreni la sanktan komunion en la eklezio, al kiu mi tiam apartenis. Sed tiam estis profunda malpleno en mia koro kaj dezirego, kiun nur Dio povis satigi. Tamen ŝajnis, ke mi ne konsciis pri tio...

Dum mia tria jaro en la universitato, la malboniganta akademia situacio, kune kun la timego pri kultaj membroj — pri kiuj mi jam artikolis en iu kristana gazeto — necesigis mian aliĝon al religia grupo kaj mi preferis ekumenan grupon. Dio ne nur ebligis al mi akademian sukceson kaj sekurecon de la kultaj grupoj universitataj, sed Li ankaŭ savis mian animon, kvankam mi tiam ne serĉis savon. Mi ne tute cedis min per servo ĝis kelkaj semajnoj antaŭ komenco de mia junulara servo nacia, deviga programo, al kiu universitataj finstudintoj niĝeriaj devas partopreni.

Ekkreskis en mi arda deziro servi Dion pro Lia boneco. Mi do aliĝis al kristana grupo de junulservintoj, ĉe kiu mi junulservis. Tiam estis unu fojo, kiam mi forvojaĝis ekster mia regiono, ĉar oni ne devus servi inter sia gento. Ni vizitis vilaĝon por prediki la evangelion. Kun ĝojo ni toleris malsaton, malfacilajn piedirojn, insulton ktp.

En mia kristana vivo kaj rilato kun Dio mi rimarkis — aŭ ĉu mi ne pravas? — ke Diaj paŝoj ŝajnas esti tro larĝaj al miaj: dum junulservo oni ordinis min servi kiel ĉefredaktoro pri la gazeto, kiun mi eldonis; kiam mi revenis post la servo, oni ordinis min kiel pastoro: mi pensas, ke tempo por tio ne jam maturas. Ĉion mi akceptas kaj plu mi akceptos kun dank al Dio.

Pro la boneco de Dio, ĉu ekzistas tutmonde alia homo, kiu ŝuldas al Dio servon, tiom kiom mi?

Olúwábùnmi Gabriel Òshó-Davies

## HIMNO POR ŜTONOJ VIVANTAJ

Vivanta Ŝtonego, ho Di', Vi estas,
Kaj ni kiuj ĉe Vi ĉiam restas
Eterne restos Viaj bonaj pecoj,
Verŝitaj per Viaj diaj ecoj.

Ni nun cedas al Via celo bona,
Ke pere de spirito sindona
Fortan korpon kristanan ni konstruos,
La laboron satanan detruos.

Super ni, vivantaj ŝtonoj, spiru nun,
Kaj ni brilos pli forte ol la sun';
Ĉiun nian kristanan taskon benu,
Per Via forta Mano nin tenu.

Olúwábùnmi Gabriel Òshó-Davies
la 5a de junio, 2002

Mi verkis ĝin laŭ la muziko de la himno angla:

*Brightest and best of the sons of the morning*
*Dawn our darkness and lend us thy aid*
*Star of the east, the horizon adorning*
*Guide where our Infant Redeemer is laid.*



## BIBLIA RAKONTO REVERKITA

### LA KAŜA VIZITO (HELPTEKSTO: JOHANO 3:1–12)

La mallumo jam kovras la Izraelan landon: kaj la luno duon-sukcese luktas kontraŭ la mallumo. Tamen Dio estu benata. kiu ĉiam sendas mallumon, por ke homaro ripozu el siaj ĉiutagaj taskoj, alie iuj senĉese laboregus ĝismorte.

En iu eta ĉambro ripozas ankaŭ Jesuo kaj kelkaj disĉiploj. La disĉiploj jam fordormas, sed Jesuo ankoraŭ komunikas kun la Ĉiela Patro per preĝo. Subite la komunikado rompiĝas kiam eksonas manfrapoj kontraŭ la pordo. La Sinjoro senhezite staras kaj malfermas ĝin.

Je la enirejo staras unu el la tre altrangaj homoj en la lando. Se Kristo estus ordinara homo Li timus ke tia homo venas al Li. Li pensus ke eble io jam ne estas en ordo. Aŭ eble Li tute konfuziĝus pro nescio de la kialo de la vizito. Se la leganto vidus la vizaĝon de Kristo li scius ke Li estas tute kvieta. Sed sur la vizaĝo de la riĉulo, nomata Nikodemo, estas granda demandosigno. Oni pensus ke li venas ja ĉar li ne povas dormi, ĉar ekzistas enigmo kiu solviĝu. Estas kvazaŭ la solvo de la enigmo la medikamento kiun li bezonas por povi dormi.

Se Jesuo ne estus Ĉiopovulo, Li ja ne rekonus la Ĉefon en tiu ordinara vesto per kiu li decidis vestiĝi por ke oni ne rekonu lin kiam li venas al Kristo. Ĉu li pensas ke oni priridos lin, ke li vizitas malaltrangan civitanon kiel Jesuo? Eble ne, eble li decidis alivestiĝi pro timo de rimarkoj de aliaj membroj de la sinedrio. La puno povus esti tiom alta kiom eksiĝo el la plej altranga grupo en la lando.

Ĉefo Nikodemo staras antaŭ Kristo. Li fiksas siajn okulojn al la juna viro kiu tiom grande per mirakloj apenaŭ kaŭzas politikan ĥaoson en la lando, pro kio nun fojfoje kunvenas la sinedrio por decidi kion fari; ĉar iuj nun ĵaluze opinias, ke Kristo baldaŭ kaptos la regnon dank' al Lia povo fari miraklojn. Eĉ la skribistoj kaj ĉefpastroj ĵaluzas ke juna viro povas parkere diri la leĝojn kiujn ili multjare studis sed povas apenaŭ legi ilin senerare. Eĉ ke Li faras la miraklojn estas alia ilia problemo. Li per la mirakloj forlogos de ili la civitanojn kiuj jam dependas de ili rilate al la solvoj de siaj problemoj. Neniam li tiom apude staris kun la Sinjoro. Estas al li mirakl̄o ke tiuj grandaj faroj pri kiuj oni vaste rakontas, estas faritaj de tiu ĉi civitano.

Kion li diru? Nikodemo, kiel li staras antaŭ Kristo, sentas sin katenita de la supera potenco. Li sentas sin senriĉa antaŭ la Posedanto de ĉio kio ekzistas (Psalmo 24:1). Li sentas sin senpova antaŭ la Ĉiopovulo (Jesaja 9:6). Sed kio pri la granda demandosigno en lia koro? Li ne volas reiri hejmen sen forigi la signon, sen solvi la enigmon pro kiu li riskas sian vivon venante al Kristo en la nokto.

Dum longa tempo, starante senparole antaŭ Kristo, li meditas pri la miraklaj faroj de la juna viro. Finfine li rompas la silenton. „Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio, ĉar neniu povas fari tiujn signojn kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li".

Tiu diro eble ne tute solvos sian enigmon, sed li scias, ke je tiu ĉi punkto li devas diri ion. La demandosignon estigas lia scivolo pri la superhoma povo kaj kapablo de Jesuo kaj la maniero laŭ kiu Li instruas. Kvankam, kiel altranga civitano, li

neniam ĉeestis dum Kristo instruis aŭ faris miraklojn, sed li jam aŭdis la onidirojn pri lia potenco. Se li estus ordinara civitano, kies ĉeesto ne estigus scivolemon de la homaro, li mem vizitus por ankaŭ sperti la eksterordinarajn farojn. Estas nedigne por li viziti, laŭ lia opinio, ne pro sia mema personeco, sed pro lia altranga pozicio en la lando.

Eble li esperus ke Kristo fiere respondus: „Jes, vere Dio estas kun mi, fakte, mi estas la solenaskita Filo de Dio". Sed ne! Kristo respondas surbaze de io al Li tre grava, io pri kio Li venas al la mondo, io tre urĝa: „Vere, vere, mi diras al vi: se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio".

Kian rilaton havas la diro de Nikodemo kaj la respondo de Kristo? Al Kristo ne gravas la mirakloj ĉar eblas ricevi ilin kaj tamen maltrafi la regnon de Dio! Krom tio mirakloj estas ordinaraĵoj al Dio, la Faranto. Vere! Vere! Ke Kristo tiom akcentas la respondon, atentigas Nikodemon, kaj altigas lian scivolemon.

Denova naskiĝo! Kion signifas tio? Li estas riĉulo, potenculo kaj gravulo, sed neniam lia riĉeco aŭ potenco kondukis lin al loko kie tia afero estis diskutata. Denova naskiĝo! Neniam oni priparolis tion al li. Vidu, kara leganto, altrangan civitanon de la lando, unu el la 71 homoj plej gravaj! Li staras konfuzita antaŭ la filo de ĉarpentisto senedukita. Li jam decidas ne reiri hejmen sen solvi la enigmon kiu nun eĉ pli kaj pli iĝas granda. Li pensas: ĉu do neniu el tiuj kiuj nun vivas en Izraelo kaj la tuta mondo vidos la regnon de Dio? Vere, temas pri grava afero! Sed ĉiu jam kreskis... Li, kvankam estante altrangulo, ne povas plu kaŝi sian malsuperecon rilate al scipovo, kaj do respektoplene faras alian demandon, „Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? Ĉu li povas eniri denove la ventron de sia patrino kaj naskiĝi?"

Dankon pro lia scivolemo. Dankon ke li ne kiel la skribistoj kaj fariseoj pretendas scii kiam fakte li ne scias. Per „Vere! Vere!" Kristo klarigas kiel denove naskiĝi: El akvo kaj la Spirito. Tiu akvo estas la vorto de Dio (Jakobo 1:18; 1Petro 1:23). Tiu Spirita naskiĝo temas pri savo (Johano 7:37-39).

Sed ĉion ĉi Nikodemo ne komprenas, kvankam estante instruisto de Izrael. Li reiris hejmen, sed ankoraŭ ne solviĝis lia problemo. Kun aŭtoritato parolis Kristo. Certe Li diris ia veron, sed Nikodemo ne komprenis. Regis en lia koro granda soifo al la regno de Dio. Dank' al la Spirito de Dio, kvankam li ne plu vidis Kriston ĝis Li krucumiĝis, Spirito kiarigis ĉion al li kaj li ja ricevis la gracon esti denove naskita. Kiam unuafoje li kontaktiĝis kun Kristo, li pro timo aŭ honto venis en la nokto, sed je la dua — tamen nur kun Lia senviva korpo — li jam unue kontaktiĝis kun la Spirito por denove naskiĝi, kaj nun venis malkaŝe sentime kun miksaĵo de mirho kaj aloo (Johano 19:39) por ĉirkaŭvindi la korpon per tolaĵoj kaj aromaĵoj.

Nun kara leganto, ĉu ankaŭ vi ne jam denove naskiĝis? Dank' al Dio, vi ne bezonas scivoli kiel denove naskiĝi. Per la rakonto pri Nikodemo vi jam scias. Nikodemo estis altranga kaj riĉega, sed li sciis ke ĉimonda povo aŭ riĉeco ne povas vidigi al homo la regnon de Dio. Kiu ajn vi estas, vi bezonas denovan naskiĝon se vi ne jam renaskiĝis. Do ek al tio! Denove naskiĝu nun kaj vi certe vidos la regnon de Dio. Vizitu pastron kiu helpos vin pri tio.

Pastoro Olúwábùnmi Gabriel Nashó-Davies



# LA DU INSTRUISTOJ

Post la vinigo de l'akvo en Kana Galilea Jesuo montris multajn miraklojn, kaj jen dum la Pasko *multaj fidis al lia nomo, vidante la signojn, kiujn li faris* (Joh. 2:23). Inter tiuj multaj estis Nikodemo, pri kiu rakontas la sekvanta ĉapitro.

Li ne estis ordinarulo, sed ĉefo inter Judoj, kaj eble tial venis nokte (t.e. post la 9a vespere, laŭ hebrea tempokalkulo), kaŝe de ĉies okuloj. Tamen, kial oni venas ĉe iu post la sunsubiro, kial oni frapas la pordon de iu, kiu eble jam enlitiĝis? Nur por diri ke tiu estas „instruisto veninta de Dio"? Sed la popolo jam estis agnoskinta ĝuste la samon!

La vortoj de Nikodemo aŭdiĝas kiel la antaŭparolo, ŝajne la plej grava afero estis pritraktota poste. Ĉu li volis proponi al la Filo de Dio ian „interkonsenton" aŭ eĉ komenci inter Li kaj la Fariseoj „ekumenan dialogon"?

Kiel reagis Jesuo? Ĉu Li pacience finaŭskultis la noktan gaston? Ĉu Li modeste respondis: „Ne trolaŭdu min" aŭ „Dankon pro viaj afablaj diroj"? Neniel! Li haltigis la parolon de Nikodemo mezvoje el la buŝo kaj diris ion tute nekutiman:

— *Vere, vere mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio... Ne miru ke mi diras al vi: Vi devas esti denove naskitaj* (3:5 kaj 7).

Pri la akvobapto Nikodemo ja sciis: la perakva purigado estis kutima ĉe la Judoj (vidu ekzemple Levidoj 8:6), poste Johano la Baptanto plenigis la antikvan riton per nova enhavo. Pri la Spirito Nikodemo sciis iom el la Sankta Skribaro... Pri la alproksimiĝinta regno de Dio li aŭdis eble el la buŝo de Johano kaj de Jesuo mem.

Sed jen neniam aŭdita enigmo: naskiĝo denova! Jesuo kvazaŭ estus parolinta iun lingvon nekonatan... La fama leĝinstruisto eĉ ne kaŝas la malkomprenon:

— *Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna?* (Johano 3:4)

La respondo de la „instruisto veninta de Dio" sonas riproĉe:

— *Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas...* (samloke, v. 12a).

En tiu ĉi frazo troveblas du rimarkindaĵoj. La unua: Jesuo ne diris „Vi ne komprenas" sed „Vi ne kredas"; kaj la dua: Li nomas la denovan naskiĝon „afero surtera"! Kaj la renaskiĝo estas ne nur ebla, sed ankaŭ nepra ĉu por simpla ordinara popolano, ĉu por la fama leĝinstruisto.

Ni legu la daŭron de la respondo de Sinjoro:

— *...kiel vi kredos se mi diros enĉielajn?* (v. 12b).

Kiom da teologoj ne spertinte la denovan naskiĝon verkis pri la aferoj tute enĉielaj dikajn volumegojn, kies enhavon ĝuas eble nur musoj kaj vermoj...

Tamen ne por kritiki la eminentan leĝinstruiston estis skribita la 3a ĉapitro de la evangelio laŭ Johano. Nikodemon venigis al Jesuo iu forto, iu animmalsato, kiun nur Dio kapablas satigi. Tiu soifo pri vero elĉieligas kaj surterigas la potencon de Dio kaj Lian volon. Ĉu ne tiel instruis Jesuo preĝi:

— *...plenumiĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero* (Mat. 6:10b)?

Vidu: Nikodemo venis ĉe Jesuo nok-

te, kaŝe, nerimarkite. Sed danke al lia veno la tuta homaro aŭdas la vortojn de Jesuo:

— *Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan filon, por ke ĉiu, kiu fidas al Li ne pereu, sed havu eternan vivon.* (Joh. 3:16)

Jen la enigmosolvo, jen la respondo por ĉiu, kiu demandas, kiel eblas naskiĝi denove.

Unue, akceptu la amon de Dio. Eĉ se vi estas vere neniu por ĉiuj ĉirkaŭuloj, eĉ se vi mem rigardante en la spegulon foje diras: „Mi estas neindulo taŭga por nenio”. Sciu do: Dio konsideras vin inda je Sia amo, sen antaŭkondiĉoj!

Due, akceptu la donon de Jesuo. Senpeka, Li estis punita pro viaj pekoj. Li donis Sian vivon por ke vi ne pereu.

Trie, fidu Lin. Eĉ se via vivo estis daŭra senreviĝo, Li estas ĉiom fidinda. Pli fidinda ol viaj scioj kaj viaj sentoj.

Kvare, akceptante la donon de Jesuo kaj donante al Li vian koron, vi havas eternan vivon. Ne havos iam en la nebula estonteco, sed nun havas kaj vivas ĝin, ĉar post la denova naskiĝo la pereo vin ne superos.

Kaj fine, ekde via filiĝo al Dio, vi iĝas ne nur civitano de Lia regno, sed ankaŭ Lia ambasadoro en tiu ĉi mondo. Ambasadoro staras sentime antaŭ fremda altrangularo kaj sencede gardas la interesojn de sia sendinto. Sciu do, ke vi estas en la servo de la Reĝo de reĝoj kaj Sinjoro de sinjoroj. Sentime aŭdigu la mesaĝon de via Reĝo:

— *Ĉar Dio tiel amis la mondon ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li ne pereu, sed havu eternan vivon* (Joh. 3:16)

La tria ĉapitro de la evangelio laŭ Johano estas ĉapitro de l'Amo kaj Savo.

## PLUGU AL VI PLUGOTAĴON...

### *Artikoloj, studoj kaj predikoj de Jozefo FARKAS, hungara reformita pastoro*

Kiam en 1986 Jozefo FARKAS kompilis la materialon de ĉi tiu libro, li jam de sesdek jaroj predikis, instruis en la Hungara Reformita Eklezio. Li studis kiel teologia studento en Halle an der Saale kaj en Ĝenevo. Li servis unue kiel junulara misia pastoro en la tuta lando. De 1948 li fariĝis paroĥestro de malgranda novfondita komunumo en malnova kvartalo, en la mezo de Budapeŝto. Tie li restis, pensiiĝis kaj servis plu aktive ĝis la morto, la 25an de decembro 1999, kiam dek minutojn antaŭ la diservo subite kaj silente haltis lia laciĝinta koro. Li ricevis 85 riĉe benitajn jarojn.

Tie li travivis kun siaj paroĥanoj la malfacilajn tempojn de ideologiaj atakoj kaj ankaŭ la premon de malriĉeco.

Nur poste, en la v. 19-21 Jesuo parolas pri la juĝado. La v. 20 parolas pri faranto de malbono kaj faranto de vero. Tute ne hazarde la malo de la vorto „malbono” ne estas „bono”, sed „vero”. Ambaŭ nepraj, la bono kaj la vero malsimilas en jeno: Jesuo volas ke la bonon oni faru kaŝe (Mateo 6:3,4), sed la veron diskriu (Luko 19:40).

Antaŭ tiu nokta vizito ĉe Jesuo, Nikodemo estis spertulo pri „la bono”. Koninte la Sinjoron, li eksciis ankaŭ la veron, ĉar Jesuo mem estas La Vero (Joh. 14:6).

Yenovk LAZIAN



Havante kvin malgrandajn infanojn li renkontis ĉiujn problemojn, kiujn devis travivi ĉiuj aliaj homoj en tiu tempo. Li konscie serĉis kaj petis la Vorton de Dio, sentante la respondecon por la ŝafoj, al kiuj li devis ĉerpi el pura fonto, kaj konduki ilin al la Ĉefpastoro.

Ĉar la Vero estis por li ĉiam la plej grava, kelkfoje li fariĝis malakceptata persono dum la diversaj ŝanĝoj politikaj kaj ekleziaj. Sed en la komunumo kolektiĝis ĉirkaŭ li homoj, kiuj ĝuste tion serĉis, lokon, kie ili rajtas dubi, meti demandosignojn, tie, kie la instituca disciplino aliloke ne permesas tion.

Dum preskaŭ kvardek jaroj — kun kelkaj interrompoj — ĉiusemajne aperis de li glosoj en la eklezia gazeto, tre popularaj pro tio, ĉar li aŭdacis skribi ankaŭ pri tute aktualaj temoj, sed ĉiu sentis, ke li serioze ekzamenis tiujn temojn ĉe la lumo de la Sankta Spirito. Kompreneble, ne ĉiuj samopiniis, sed li neniam volis persvadi iun ajn, nur sincere diri tion, kion li akceptis kiel Dian Mesaĝon.

Sub la egido de „libera praktikado de religia kulto” aperis ekleziaj eldonaĵoj regule eĉ en la plej malfacilaj jaroj, sed por la artikoloj kaj predikoj de Jozefo Farkas neniam estis „papero”. De la naŭdekaj jaroj kiel propraj eldonaĵoj aperis unue liaj prediko-serioj en malgrandaj kajeroj. Ĉi tiu libro „plugu al vi plugotaĵon” — („novan kampon” — en kelkaj aliaj tradukoj (Hos 10,12) havas ankaŭ subtitolon, „alternativa teologio” — kiu kelkajn homojn ŝokis sed pli multajn instigis trastudi ĝin.

Li neniam arogis al si, ke tio estas la unika kaj lasta Vero kiun li malkovris, sed humile kaj konscie atestis pri tio, kiel li ricevis Lumon kaj Mesaĝon el la graco de la Sinjoro. Sciante pri tio ke multaj pensemaj homoj stumblis jam pro rigidaj predikoj li sentis la respondecon oferti helpon por „vero-serĉantoj”.

Tiu ĉi libro rapide elĉerpiĝis kaj jam la duan fojon estis eldonita, ĉar vere multaj legis ĝin kun granda ĝojo. Nun ĝi aperos ankaŭ en angla lingvo. Por prezenti iom el ĝia direndo mi tradukis tiun resumon, kiun Jozefo Farkas mem metis al la fino de la libro.

### Resumo

La plej gravaj tezoj el la libro: *Plugu al vi plugotaĵon–Alternativa teologio*

1. Dio ne estas tia, kiel ni lernis en la religio-instruado aŭ en la predikoj. Estas promesite al ni, ke Dio mem instruos nin (Joh. 6,45; 1 Tes. 4,9) „ĉiuj estos instruitaj de Dio”, „vi mem estas instruitaj de Dio”.

Dio estas tia, kia estis Jesuo, la Nazaretano.

2. La Biblio ne estas kolektaĵo kaj trovejo de dogmoj, sed fajrejo de la Sankta Spirito. La vorto (litero) en si mem ne estas Vorto de Dio. La vorto, ekbruligita de la Sankta Spirito fariĝas Vorto.

3. Jesuo ne pretan konstruaĵon, sistemigitan teologion, dogmaron postlasis por ni, sed konstruelementojn, Vortojn, ne enigitajn en sistemon, el kiuj ni mem devas konstruadi. Ekzemple la teologio de apostolo Paŭlo estas iu ebla konstruaĵo surbaze de Lia morto kaj resurekto, sed apenaŭ surbaze de Liaj instruoj! El la samaj konstruelementoj (ĉefe el la kvar evangelioj) eblas konstrui ankaŭ alispecan konstruaĵon.

4. La dogmoj ne helpas, sed malhelpas

la personan (individuan), liberan, viglan spiritan vivon. Ĉi tiu libro ne estas „sistema teologio", nur tia persona konfeso, en kiu estas enkalkulita ankaŭ la eblo de eraro. Sed mi atestas pri tiu granda evangelio, ke nenion damaĝas la dogmatikaj eraroj se la Graco purigis nian koron.

5. Plenan homan vivon oni povas vivi nur per la helpo de superhomaj fortoj.

6. La Eklezio estas ligita al la Sankta Spirito, sed la Sankta Spirito ne estas ligita al la Eklezio.

7. La sanan spiritan vivon ebligas la atmosfero de libereco. Dio ekstreme estimas la liberecon de la homo. Ankaŭ ni devas estimi la liberecon de la alia homo; (animzorgado, evangelizado...).

8. Same kiel ne ekzistaj saviĝo sen ekstera helpo, tiel ne ekzistas saviĝo ankaŭ sen la mobilizado de niaj propraj — ofte profunde kaŝitaj — internaj energioj.

9. Ekzistas heredita peko, sed ekzistas ankaŭ heredita boneco.

10. Saviĝo estas: la Spirito de Jesuo okupas kaj plenigas min kaj potenciĝas en mi.

FARKAS-TATAR Éva

# LIBERAJ EVANGELIAJ KOMUNUMOJ

La prezentado de la Remonstrantoj fare de Gerrit BERVELING donis al mi la ideon fari samon pri la eklezio, al kiu mi apartenas. Ĉe tio unue estiĝis la demando, kiel traduki la nomon (germane: *Freie Evangelische Gemeinden*). Mi lernis, ke la ĝusta traduko de evangelisch estas protestanta. Sed ĉi tie ne estu unuavice indiko de konfesio, sed oni intence havas la Evangelion en sia nomo. Mi povus uzi la vorton evangelika, kiu iagrade estas trafa kaj kongruas kun la angla nomo, kiu enhavas *Evangelical* — sed ne kun la germana. Cetere ankaŭ tiu vorto pli indikas fakon por formeti ĝin ol enhavon. Do mi finis ĉe evangelia. Tiel mi same kiel ĉe la tria parto de la nomo sekvas la uzon en *Adoru* (pli pri la tiea mencio de tiu eklezio fine de ĉi tiu artikolo). Laŭ nia kutimo multe uzi esprimojn el la Nova Testamento (ekz. frat(in)o por kunkristan(in)o) kaj laŭ la nomo en pluraj aliaj lingvoj devus esti eklezio. Tamen estas iom konfuze, ĉar pli kutima signifo de eklezio pli bone aplikeblas al la tuto — do eklezio, kiu konsistas el eklezioj?

Facile tradukebla estas la unua parto de la nomo. Kaj tiu epiteto libera en pluraj facetoj montras specifaĵojn de Liberaj Evangeliaj Komunumoj (LEK–oj):

Unue, ili estas sendependaj de aliaj eklezioj kaj de la ŝtato.

Due, ĉiu unuopa komunumo havas laŭeble grandan aŭtonomion. La tutlanda organizaĵo estas nur ligo por transpreni taskojn, kiujn komunumo ne povas plenumi sola. Des pli tio validas por la Internacia Ligo de LEK–oj, kiu havas nur kunordigan rolon.

Kvankam ne tiel rekte legebla el la nomo, eble plej grava faceto de libereco estas emfazo de libera decido. Tio precipe rilatas al membriĝo kaj bapto. Do en LEK oni nek baptas infanojn nek akceptas ilin kiel membrojn. Sed tiuj du aferoj estas tute sendependaj unu de la alia — kio estas la ĉefa diferenco kompare kun Baptistoj. Do BERVELING malpravas ĉe lia supozo, ke nur Remonstrantoj agas tiel. La emfazo pri libera decido estas unu sekvo el orientiĝo, kiun mi emas esprimi tiel, ke ni estas protestantoj de protestantoj: La slogano de LUTHER estis „nur per kredo, nur per graco, nur la Skribo, nur Kristo", celante la personan savon; por ni tio ankaŭ esprimas la pintajn principojn de la tuta eklezia vivo. Do la libera decido de ĉiu persono ne signifas laŭplaĉecon por la komunumo, sed inverse: kondiĉon: Nur homo, kiu decidis akcepti Jesuon Kriston kiel sian Sinjoron kaj Savanton, havas plenrajtan lokon en la komunumo.

Ĉe klopodoj eltrovi ion pri historio, mi trovis konkretajn informojn nur por germanaj LEK–oj, kvankam almenaŭ en Svisio kaj Francio ili jam ekzistis antaŭe. La unua germana LEK fondiĝis ĉefe per iniciato de Hermann Heinrich GRAFE [herman hajnriĥ grafe] en la jaro 1854 en Elberfeld–Barmen, la hodiaŭa urbo Wuppertal. GRAFE antaŭe agis misie en transkonfesia asocio. Serĉante hejmon por la novkredantoj, li post konsidero opiniis taŭgaj la ekzistantajn komunumojn nek por ili nek por si mem, interalie ĉar ankaŭ nekredantoj kaj malamikoj de Jesuo Kristo havas ankoraŭ spacon. Mi atentigas pri la vorto „ankaŭ". Li do ne neis, ke ekzistas kredantoj kaj amikoj de Kristo en tiuj komunumoj, sed oni montris troan, ĉar mispravigan toleremon kontraŭ aliuloj. La unuaj sekvaj komunumoj estiĝis el la sama misia asocio. Poste ili disvastiĝis tra tuta Germanio, kvankam ili ankoraŭ estas plej fortaj en sia origina regiono, la hodiaŭa federacia lando Nordrejn–Vestfalio. En Germanio membras en ĉ. 370 LEK–oj ĉ. 30.000 homoj. Datumojn pri aliaj landoj mi ne havas.

Ĝeneralaj konstatoj pri la praktika flanko de eklezia vivo ne estas facile fareblaj eĉ nur por Germanio ĝuste pro la aŭtonomio de la komunumoj. Ekzemple ofte troveblas tre konservativa sinteno rilate al la rolo de virinoj en la eklezio (mia propra ĉefa kritikpunkto), sed finfine tio estas decidebla de ĉiu komunumo mem. Ankoraŭ pli tio validas por la formo de diservoj.

Ĉiukaze oni rimarkas multrilate engaĝiĝon de la membroj kaj pli da sindono ankaŭ flanke de la pastroj, komparante la averaĝon kun la tiel nomataj popolaj eklezioj. Diservoj estas viglaj (sed almenaŭ ĉe ni ne tiel emociplenaj kiel ĉe Pentekostanoj). Malgraŭ malaltaj membronombroj en multaj kazoj pli da homoj vizitas diservon ol ĉe Luteranoj (kie mi membris ĝis antaŭ sep jaroj). Multaj taskoj funkcias honorofice. Kotizoj ne ekzistas, sed ĉiu donacas laŭ sia konscio.

La artikolo vole–nevole akcentis diferencojn al aliaj eklezioj. Mi hezitis tion fari, ĉar pli gravas nia komuna kredo je Jesuo Kristo. La Apostola Kredkonfeso estas ankaŭ nia bazo. Sed antaŭ kristana, plejparte eĉ protestanta publiko ne utilas multe detaligi en tiun direkton. Almenaŭ la fino estu pli transponta, kiam mi mencias la nomon de la nuna prezidanto de la Ligo de LEK–oj en Germanio, Peter STRAUCH [ŝtraŭĥ]. Ĉar li havas renomon ankaŭ ekster LEK–oj kiel verkisto de kantoj. Unu el liaj kantoj trovis lokon en „Adoru": „Di–Amantoj estos kiel la suno" sub numero 648.

Reinhard PFLÜGER

# LA KULPA FILO

**(kristana fikcio)**

Iam vivis tre olda viro kun siaj du filoj Seyi kaj Seye en kabano malgrando. Informo pri patrino mankas, sed estas klare, ke la viro olda estis ilia patro, ĉar ili tre similis lin.

La viro posedis etan bienon, sur kiu ĉiuj laboris ĉiutage por subteni la familion. Ĉio iris bone en la familio dum tre longa periodo, ĝis tiam kiam io sekreta okazis, pro kio Seye perdis sian pacon kaj bonan rilaton kun la patro. Jen kiel ĝi okazis:

Iam forveturis la olda viro al alia vilaĝo, kaj antaŭ reveno, Seyi, la pli juna filo jam erare mortigis unu kokon. Por ke la patro ne riproĉu lin, Seye konspiris kun li forĵeti la mortigitan kokon por malebligi ekscion pri kio ja okazis. Tamen Seye igis Seyi promesi, ke ekde tiam la duono de sia manĝo ĉiam iros al li. Tiel li akceptis repagi sian fraton pro lia konsilo.

La afero restis sekreto inter la du fratoj. Tamen la manĝmaniero de Seyi ŝanĝiĝis. Li ne emis manĝi tuj kiam manĝo estis preta. Li manĝis sole kaj sekrete, ĉar li devis kaŝi la duonon por Seye, kaj la patro ne sciu pri tio, ĉar oni devos klarigi ĝisfunde, ĝis la tago, kiam li promesis ekperdi duonon de sia ĉiu manĝo. Li timis, ke eble iun tagon la sekreto estos malkaŝita. Pro emocia ĝeno kaj misnutrado lia sanstato komencis malboniĝi.

Sensukcese la patro penis esplori la aferon. Ankaŭ Seye timis. Li sciis, ke la patro pardonus Seyi, se li scius kio okazis, kaj li kulpigos lin pro lia faro kontraŭ lia frato. Sed li jam delonge profitis el la afero, tiom ke ekperdi duonon de ĉiu manĝo de frato, estis malfacila afero por li. Li estis tiom zorgema, ke li ne permesis Seyi ekscii pri lia timo. Nur tiel povus eterne resti ilia interligo.

Foje, kiam memoris Seyi la bonecon, kompatemon kaj pardonemon de sia patro, li ja volis iri al li, kaj genuante antaŭ li, konfesi pri sia malbona faro, por ke paco kaj ĝojo revenu al lia koro, sed ĉiufoje Seye diris, „Memoru kokon", kaj Seyi tuj ŝanĝis sian planon.

Post longa tempo, pro emocia ĝeno kaj misnutrado, Seyi tre malsaniĝis kaj li troviĝis en hospitalon. Oni ne povis garantii, ke li ankoraŭ vivos.

Iun tagon, kiam la suno ekkaŝis sin malantaŭ la horizonto, Seyi decidis ne plu kaŝi la sekreton, li invitis sian patron kaj fraton por alparoli ilin. Nu, li certis ke la patro ne punos lin pro la ofendo, nun ke li estis tre malsana. Li rakontis ĉion al sia patro dum aŭskultis Seye. Certe, la patro plore pardonis: plore ĉar Seye estis malbona filo kaj frato, plore ĉar Seyi ne sciis sian rajton kiel lia filo, kaj senplue akceptis la opinion de Seye.

La rilato inter Seyi, Seye kaj ilia patro multe similas la rilaton inter multaj kristanoj, la Diablo kaj Dio. Ili permesas Diablon dikti al ili kiel rilati kun Dio. Li memorigas ilin pri iliaj pekoj, dirante ke Dio ne pardonas. Li kaŝas for de ili la permeson de Dio, kio estas: *nur momenton daŭras Lia kolero, sed tutan vivon daŭras Lia favoro* (Psalmo 30:5), kaj *venu, kaj ni faru inter ni juĝan disputon... se viaj pekoj estas sangoruĝaj, ili fariĝos blankaj kiel neĝo...* (Jesaja 1:18). Li eble punos ilin pro la peko sed nur momen-

↳

te, ne eterne. La diablo profitas, kiel Seye kiam kristanoj pro siaj pekoj forkuras el ĉeesto de Dio. Kiam ili aŭskultas Diablon, tiu donas konsilon kiu malebligas repacigon inter ili kaj Di-patro kaj Diablo ĝojas ĉar el tio li profitas. Tamen Dio scias ĉiun sekreton de nia koro (Heb 4: 13), sed Li volas, ke ni venu al Li, 'plore' desapontiĝas ke ni foje preferas aŭskulti akuzon de Diablo ol Lia ama invito, senplue akceptante la opinion de nia Ĉefmalamiko...

Nu, gefratoj en Dio, ne gravas kiom granda via peko estas, iru al Dio, kiel Davido ĉiam faris, kaj pardonpetu. Li ja pardonos!

*Nur momenton daŭras Lia kolero!*

Olúwábùnmi Gabriel Òshó-Davies



# MARIA KAJ MARTA

Kiam ni regule nutras nin el la Biblio, povas okazi, ke ni renkontas iun historion, iun parabolon, iun kazon, kiu ŝokas nin, ni ne komprenas kaj ne povas/volas akcepti ĝin. Se ni tiam pro malkonsento ne plu povas daŭrigi nian vojon post Jesuo, tio estus tia kazo, kvazaŭ ni elĵetus bonan manĝaĵon ĉar ni trovis en ĝi pecon da osto. Tion ni metu sur la telerrandon kaj daŭrigu la manĝadon!

Io tia okazis al mi, pri kio mi nun rakontas. Mi estis juna edzino kun malgrandaj infanoj, kiam mia edzo fariĝis pastoro de malgranda reformita komunumo en Budapeŝto. Post la dua mondmilito la vivo estis sufiĉe malfacila; fizike kaj anime estis granda ŝarĝo por malsperta, juna virino.

En la komunumo estis vigla vivo. Ĉiuvespere estis iu biblia-horo, preĝo-horo. Kun soifaj koroj homoj venis kaj aŭskultis la Evangelion. Mia edzo predikis kaj la Sankta Spirito benis tion. Kaj mi hejme ofte sentis min malkontenta, enviis tiujn virinojn, kiuj ĉiam povis ĉeesti kaj aŭskulti la bonegajn instruojn... Kaj mi ne ŝatis la historion de Maria kaj Marta el la Biblio! Mi grumblis: „kion alian povus elekti la kompatinda Marta, se Maria jam eksidis al la piedoj de Jesuo? Iu do devis fari por ili ĉiuj la manĝaĵon!" ktp.

Foje ni prepariĝis por la internacia ekumena preĝo-semajno en la tria semajno de Januaro. Mia edzo tiel dividis la taskojn en la preĝo-semajno, ke ĉiuvespere tiu enkondukis la komunan preĝadon, kiu tiutage kutimis gvidi la kunvenojn. Jam antaŭe li petis min, ke mi faru tion merkrede. Nek li, nek mi sciis tiam kiuj estos la temoj. En mia kapo nur traflugis ke; „ho, ve, nur ne estu la historio de Maria kaj Marta!" — kaj imagu, tio estis! Mi ekploris kaj petegis:" Nu, mia Sinjoro nun klarigu al mi kiel mi komprenu tion, ĉar mi devas paroli pri tio al la homoj, kiuj sidos tie! Kion mi faru?"

Subite eklumis ie — ĉu en la koro, ĉu en la kapo — kiam Jesuo tion diras al siaj disĉiploj: „Estas bone por vi, ke mi foriros; ĉar se mi ne foriros, la Parakleto ne venos al vi; sed se mi foriros, mi sendos lin al vi" (Joh. 16,7). Jes, jes mia kara Jesuo, Vi pravas! Kiam Vi en homa korpo estis inter ni, ankaŭ vi povis esti samtempe nur en unu loko. Sed nun per Via Sankta Spirito Vi povas esti kaj en la komunumoj, kie oni predikas la Evangelion, kaj apud tiu virino, kiu manĝigas kaj lavas siajn infanojn, kaj apud tiu, kiu flegas malsanulon aŭ konsolas mortanton!

Tiel ni ĉiuj povas elekti „la bonan parton" (Luk. 10,42) kaj Jesuo per sia Spirito povas esti apud ni, plenigi nin per sia ĝojo kaj transdoni al ni mirindajn instruojn se ni humile malfermas niajn korojn antaŭ Li.

Kore salutas vin ÉVA FARKAS-TATÁR

# AL LINGVA DEMOKRATIO!

## ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO (kaj aparte al la membroj de UEA/TEJO/ILEI)

Karaj membroj (kaj ne-membroj),
ni dankas ĉiujn tiujn el vi, kiuj dum la pasinta jaro kunlaboris kun siaj asocioj por la plenumo de la taskoj de la labor-plano. Laŭ via memoro ni estas speco de „garantia komisiono", kiu certigas, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizaĵoj.

La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:
* informado
* instruado
* utiligado
* plijuniĝo
* tutmondiĝo
* profesiiĝo

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. Cetere la teksto de la laborplano estas ricevebla per mesaĝo al <uea@co.uea.org> aŭ per aliĝo al la listo <al-lingva-demokratio@yahoogroups.com>.

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo informado kaj papera kaj reta, kaj kelkaj progresoj estis realigataj en ĉiuj aliaj labor-kampoj. En la nova jaro ni bezonas doni apartan atenton al „instruado", „utiligado" kaj „plijuniĝo".

Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo estu almenaŭ unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso <al-lingva-demokratio-subscribe@yahoogroups.com>.

Ni kopias frazon de la pasintjara mesaĝo, kiu restas daŭre aktuala: „Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo".

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato CORSETTI, prezidanto de UEA
Holger BOOS, prezidanto de TEJO
Maŭro LA TORRE, prezidanto de ILEI
Trevor STEELE, ĝen. direktoro de UEA

# TIO DEPENDAS DE VI!

Iam knabo ekvojiris al
Hinduja miraklo-faranto.
Ĉi tiu kapablis diveni ĉion
kion oni havas en la mano.
La knabo pripensis ruzon
por esti pli ruza ol la miraklisto.
Li havis birdeton en siaj manoj:
tion la miraklisto certe divenus.

Sed tuj li farus la demandon:
„Ĉu mortinta aŭ vivanta?"

Se la miraklisto dirus: 'vivanta',
li ĝin mortigus enmane pinĉante
kaj pli ruzus ol la miraklisto.
Se li dirus: 'mortinta',
li malfermus siajn manojn
kaj igus ĝin forflugi.
La miraklisto divenis la birdeton.
Sed kiam la knabo demandis:
„Ĉu mortinta aŭ vivanta?",
silentadis la miraklisto.
Li tre longe pensis kaj meditis
kaj finfine eldiris sian opinion.
„Tio dependas de vi!"

La birdeto en niaj manoj,
la trezoro en niaj manoj,
la kapitalo kiun ni administras:
„Ĉu mortinta aŭ vivanta?"

Tio dependas de ni!

Fonto: Oiko Credit
traduko: Jacques TUINDER

# INTERLINGVISTIKO POPULARIĜAS

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam MICKIEWICZ (en Poznań, Pollando) atingis gravan momenton fine de septembro, nome la unuaj gestudentoj finis siajn studojn kaj sukcese defendis sian diplomlaboraĵon: Lenĉe EFREMOVA el Makedonio prezentis la rolon de rido en la poemoj de BAGHY, Andreas EMMERICH, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio analizis la E-lingvan tradukon de „La Mastro de la Ringoj" de TOLKIEN kaj Peter ZILVAR same el Germanio komparis la vortprovizon de kelkaj bazaj vortaroj esperantaj kaj etnolingvaj kaj el ili kunmetis vortliston por la proponata Eŭropa lingvoatestilo.

Dum la sama semajno (23-27.09) 23 novaj gestudentoj komencis siajn studojn. La Interlingvistikaj studoj allogis interesitojn ne nur el Pollando kaj la ĉirkaŭantaj landoj (Germanio, Litovio, Rusio), sed ankaŭ el Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Svedio kaj eĉ el Irano. Ses el inter ili povis partopreni dank'al la stipendioj de ESF (Esperantic Studies Foundation) kaj unu dank'al la stipendio ofertita far s-ino Mila van der HORST-KOLIŃSKA.

La internacia studentaro ĝuis la prelegojn de internacia profesoraro. Kun prof. WELLS (Britio) ili malkovris la sekretojn de sonoj. Prof. Geraldo MATTOS (Brazilo, prezidanto de la Akademio de Esperanto) prezentis al ili originalan aliron al literaturo surbaze de la unua periodo, kun la kontribuo de la poetino Lidia LIGĘZA kaj de Tomasz CHMIELIK. D-ro Zbigniew GALOR (el la surloka stabo) enkondukis la aŭskultantojn en la multkoloran E-kulturon kun la kontribuo de s-ino Zofia BANET-FORNALOWA pri E-teatro kaj de Judit SCHILLER pri E-filmarto. La partoprenantoj ekkonis kaj mem komparis la diversajn formojn de lingva kaj nelingva komunikado en interkultura kunteksto laŭ la instigo de D-ino Ilona KOUTNY, gvidanto de la studoj.

La interkomunikado daŭris vespere kaj semajnfine, kiam okazis la tradicia kultura renkontiĝo Arkones en Poznań. La kulturajn konojn kompletigis interalie la impresiga spektaklo de Jerzy FORNAL (Aniaro) okaze de la 20-jara jubileo de lia unupersona E-teatro kaj muzika koncerto de Leszek DOBROWOLSKI, Oĉjo DADAEV, Zuzanna KORNICKA kaj de Mikaelo BRONŜTEJN kun mielvino. Multaj aliaj prelegoj (pri VARANKIN, DOSTOJEVSKIJ, Eŭropa identeco, alfabetoj de Eŭropo, tradukarto, E-vortaroj en la reto, ktp) kaj diskutoj amuzis la homojn. La kunordigo de la du eventoj pruviĝis ankaŭ ĉi-foje fruktodona.

D-ino Ilona KOUTNY

## GAZETARA KOMUNIKO

**Hofheim, 21.07.2002**

Pledo venki religiajn antajuĝojn kaj konfliktojn — Manifesto direktita al la religiaj gvidantoj de la mondo far la internacia bahaa gvidorgano.

Per urĝa apelacio venki religiajn antaŭjuĝojn kaj konfliktojn la Universala Domo de Justeco, la gvidorgano de la tutmonda bahaa komunumo, sin turnis al la mondaj religiaj gvidantoj. La bahaaj komunumoj tutmonde tiun apelacion pluperas al la sialandaj religiaj gvidantoj kaj tiel ilin alvokas estingi per decidaj paŝoj religie bazitan maltoleremon kaj fanatikecon.

La pluekzistadon de religiaj antaŭjuĝoj la okpaĝa manifesto konsideras esti serioza minaco de paco kaj prospero. „Kun ĉiu pasanta tago kreskas la danĝero, ke la etendiĝantaj flamoj de religiaj antaŭjuĝoj ekbruligos mondskalan incendion kies konsekvencoj estas neimageblaj", skribas la Universala Domo de Justeco; kaj plu: „Tragike estas ke la institucia religio, kies ekzistokialo estas la starigo de frateco kaj paco, kondutas tro ofte kiel unu el la plej grandegaj obstakloj sur tiu vojo; ni citu nur unu aparte doloran fakton: ĝi longe pruntis sian kredindecon al fanatikismo. Kiel gvidanta organo de unu el la mondreligioj, ni sentas nin responsaj postuli seriozan pripensadon de la defio al kiu tio submetas la religiajn gvidantojn".

La manifesto de la internacie elektita konsilio, kiu gvidas la kvinmilionmembran bahaan komunumon, konstatas ke la pasinta jarcento vidis neimageblajn progresojn. Tiuj kondukis al tio ke por pensantaj homoj fariĝis neakcepteblaj antaŭjuĝoj seksaj, rasaj aŭ naciaj, kaj ke malgraŭ ilia pluekzistado regas forta tendenco al ilia kompleta abolicio. Religiaj antaŭjuĝoj male regas plu tiom forte ke ili kondukis al serioza krizo kiu devus religiajn gvidantojn devigi „rompi la murojn de la pasinteco same decidofirme kiel tiuj, kiuj malfermis la vojon al la superado de antaŭjuĝoj pri raso, sekso kaj nacieco".

La mesaĝo ofertas la asiston de la bahaa komunumo entrepreni paŝojn al religia unueco, kiajn jam la interreligia movado alstrebas, kaj ĝi deklaras per siaj finaj vortoj: „Tamen, al niaj partneroj en tiuj komunaj klopodoj ni devas klare sciigi ke nia konvinko, ke la interreligia diskurso, se ĝi volas signife kontribui al la kuracado de la malsanoj kiuj turmentas malesperan homaron, devas nun trakti honeste kaj sen pluaj elturniĝoj la konsekvencojn de la plenampleksa vero, kiu estigis tiun movadon: ke Dio estas unu kaj ke, spite al ĉiuj diversecoj de kultura esprimiĝo kaj homa interpretado, la religio same estas unu".

La origina anglalingvo mesaĝo alireblas ĉe: <www.bahaiworldnews.org> kune kun tradukoj al pluraj lingvoj. La esperanta traduko baldaŭ aperos ĉe: <www.bahai.de/bahaaeligo> kaj mendeblas ĉe BEL.

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)
Eppsteiner Straße 89,
DE-65719 Hofheim-Langenhain
Tel. 06192-9929-16, faks- aŭ voĉ-mesaĝoj 01212-5-17916703

fonto: ret-info



# NOVJARA MESAĜO DE VIA PREZIDANTO


Al la tradicioj de KELI apartenas, ke ĝia prezidanto en la komenco de la nova jaro direktas sin al la membraro per kelkaj seriozaj, profundaj, inspiraj kaj kuraĝigaj vortoj. Oni povus paroli pri mesaĝo.

Unuavice miaj pensoj reiras al nia konferenco en Hungario. La temo tekstis LIMOJ, kaj eĉ la kongresanaro montriĝis mirakle limigita... Sed la etoso ne obeis al homaj limoj! — Due mi menciu la festan tagon en Aalen honore al triopo kiu 'miraklis' nian ekumenan kant- kaj preĝ-libron *ADORU*. Denove mi kore gratulas al Adolf BURKHARDT, Bernhard EICHKORN, Albrecht KRONENBERGER (kaj Josefo ZIELONKA) pro ĉi tiu alta kaj nepre meritita distingiĝo.

La hieraŭan vesperon mi ĉeestis la ĉiujaran manifestacion okaze de la *Tago de Homaj Rajtoj*. En mallumo kaj frosta malvarmo cento da homoj plurmaniere atestantaj marŝis tra la centro de mia loĝloko. Ni ĉiuj portis torĉojn, kies lumo kaj varmo estis ege agrablaj. Klare kaj konvinke heroldis la surtabulaj tekstoj, kiujn pluraj partoprenintoj montris al la publiko surstrate kaj malantaŭfenestre. Kunmarŝis minimume kvar esperantistoj, kiuj defendis la rajton de propra lingvo, de propra kulturo, de vivo en paca kaj pura socio, de instruado al vidhandikapuloj. Ĉarmaj estis la kontribuoj de infanoj en la formo de simplaj poemetoj.

Vivante en lando, kiu ĝenerale respektas homajn rajtojn, mi havis la okazon paroli pri la situacio en Moldavio. Mi menciis la mankon de advokatoj kaj juĝistoj. Mi skizis vivon en malliberejo kun ĉirkaŭ mil prizonuloj subnutritaj kaj ofte suferantaj de tuberkulozo, kompatinduloj sen eblecoj labori kaj instruiĝi. Multaj atendas dum monatoj ĝis la tago, en kiu ili finfine aperos antaŭ la tribunalo.

La vesperon organizis la loka grupo de *Amnestio Internacia*. Tiel mi kaptis la momenton por diri, ke ĝuste esperantistoj kuniniciatis tiun ade kreskantan movadon, ĉar jam la pensoj de D-ro L.L. ZAMENHOF inkluzivas respekton al la plej fundamentaj homaj rajtoj.



*Jacques Tuinder en Berekfürdő (fotis P.C.)*

Ankaŭ en niaj tagoj ni havu en niaj verdaj vicoj homojn, kiuj vorte kaj fare proklamu kaj protektu la faman deklaracion pri homrajtoj. Inter ili ne manku kristanoj. Male, ili okupu la plej unuajn lokojn! Bedaŭrinde ni devas konstati, ke la kristana Esperanto-movado stagnas, pli ĝuste malprogresas, statistike kaj videble. Ke ni kvalite ne malkresku!

Membroj de IKUE kaj KELI preparas sin por la komuna kongreso, ĉijare okazonta en Rimini (Italio). Ke venu multaj. La temo estos: „Vi estos (estu) Miaj atestantoj!" En la originala lingvo ni legas sur la loko de atestanto 'martus'; ĝi rekte kondukis al nia vorto martiro, t.e. 'sango-atestanto'.

Neniu, kiu vivas kun okuloj kaj oreloj malfermitaj, povas nei, ke bolas kaj brulas nia mondo. Kaj tiu konstato konvinku nin pri tio, ke tiu incendio estas tiom vasta kaj furioza, ke eĉ ne unu kristano povus permesi al si lasi la estingadon nur al diplomitaj fakuloj; fajrobrigadanoj estu ni ĉiuj! Ne helpas stari flanke, kriante haleluja. Ne helpas voki al la ĉielo, atendante intervenon de la Plejaltulo. Ne helpas kulpigi la nekredantojn, kondamnante ilin al inferaj punoj. Helpas akvo, sed sen manoj kaj iloj akvo ne fluas al la disaj fajrejoj. Se bapto-akvo iam tuŝis niajn kapojn kaj korojn, ek al la laboro! Senprokraste kaj energie. Ho, sur lokoj, kie kolektiĝas homoj atestantaj, mi foje vane serĉas anojn de Kristo!

KELI intencas esti kristana ligo. Nin ligas la Vorto de la Eternulo. Nin ligas Jesuo Kristo. Nin ligas amo kaj gefrateco. Nin ligas pasio al paco kaj justeco. Nin ligas la proksimulo nin vokanta, invitanta kaj bezonanta. Nin ligas homaj rajtoj, nelaste la rajto ke ĉiu plene respektu nian gepatran lingvon kaj nian ideon disvastigi neŭtralan Esperanton kiel ĉies kaj nenies lingvon.

La alvoko esti 'Mia Atestanto' starigas nin antaŭ grandega respondeco, al nesimplaj decidoj, kelkfoje eĉ al neceso de publika malobeo kiel civitano. Nenio por kristano estu tiom evitebla kiel popolareco, oportunismo kaj periferiemo. La incendio ĉirkaŭ ni trafos nin, bruligos nin, vundos nin, eble eĉ mortigos nin. Tiam ni estos atestantoj, en la senco de martiroj. Ni ĉiloke legu kaj meditu la kortuŝan kaj doloran poemon „Mia penso" de la juna ZAMENHOF:

*Kion havis mi plej karan —*
*La junecon — mi ploranta*
*Metis mem sur la altaron*
*De la devo ordonanta!*

Mi devas konfesi al vi, ke en la 'teatro' de mia vivo ĉiutaga, KELI ludas nur tre modestan rolon. Sed dum ĉiuj miaj vojaĝoj mi ade spertas, kiom bonegan solvon 'nia bona lingvo' alportus al lingve dividita homaro!

Sed mi tuj aldonu, ke en nia brulanta kaj bolanta mondo sonu ankaŭ la pripensindaj vortoj de Dietrich BONHOEFFER: *„Pro tio ke la tero estis aprobita inda por porti Jesuon Kriston kaj ke sur ĝi vivis homo kiel Li, tial kaj nur tial vivo por ni homoj estas sencoplena"*.

Al vi ĉiuj, karaj membroj de KELI, kaj al ĉiuj kiuj estas karaj al vi, mi varme kaj sincere deziras bonan kaj benoplenan jaron. Kaj tia, ŝajnas al mi, estas jaro en kiu ni klopodas savi unu homon el la maro de flamoj, ĉar tiam — laŭ la ĝenerala konvinko de judaj rabenoj — ni savos la tutan mondon. Jen mia mesaĝo. Ke alvenu jaro kun almenaŭ unu tia tago!

Jacques TUINDER



## Krucvortenigmo

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | | 3 | 4 | | 5 | 6 |
| 7 | | ■ | 8 | | ■ | 9 | |
| | ■ | 10 | | | 11 | ■ | |
| 12 | 13 | | | ■ | 14 | 15 | |
| 16 | | | ■ | 17 | | | |
| | ■ | 18 | 19 | | | ■ | |
| 20 | | ■ | 21 | | ■ | 22 | |
| 23 | | | | | | | |

### Kromsolvo

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 16 | 3 | 4 | 16 | 20 | 23 |

**horizontale:** 1. destini por religia servado, 7. inicialoj de nia majstro, 8. direkta prepozicio, 9. loka prepozicio, 10. blanka ĝispieda pastra vesto, 12. amfibio, 14. scienca prefikso signifanta „antaŭ", 16. koiparto, 17. demandan pronomon, 18. trakparto, 20. trinkaj', 21. difina artikolo, 22. neracionala cirklo-nombro, 23. kartezia koordinato.

**vertikale:** 1. ligna blovinstrumento, 2. internacia scienca sufikso, 3. natria klorido, 4. itala insul', 5. prefikso signifanta „denove", 6. granda brulo, 10. ŝipfiksil', 11. narkota substanco, 13. kemia simbolo de oro, 15. sur rumana aŭto, 17. klik', 9. virnomo, 22. kemia simbolo de plateno.

**kromsolvo:** akcepto de propono.

Fritz LAUTENBACH

## NIA KELI-PREZIDANTO 70-JARA!

La sepan de januaro 1933 naskiĝis en Hago Jacques TUINDER. Post duona jaro li transloĝiĝis kun la familio al Rotterdamo.

Kiel li konatiĝis kun Esperanto? Kiam Jacques estis 16-jaraĝa naskiĝis al li frateto. La akuŝflegistino posedis Esperanto-libreton. Li eklernis la lingvon kaj baldaŭ li korespondis kun iu esperantisto en Germanio.

Li fariĝis sociala helpisto kaj laboris en diversaj regionoj de nia lando.

En 1969 Jacques kaj Vera transloĝiĝis al la vilaĝo Heemskerk en la Nord-Okcidento de Nederlando. Tie li laboris ĝis sia pensiiĝo en psikiatria malsanulejo.

Antaŭ 37 jaroj komenciĝis la libervola laboro por la blinuloj kaj malbonvidantoj. La ideo estiĝis dum la unua Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI en Limburg ĉe la Lahn (Germanio). La modesta movado de Esperantistoj plivastiĝis ekster la Esperanto-movado kaj portis helpon kaj esperon al malbonŝancaj homoj en plej diversaj landoj en- kaj ekster Eŭropo.

Jacques plu estas multokupita persono. Li aktivas eklezie kaj en diversspecaj sociaj medioj, ekzemple en la reuza butiko en Heemskerk kaj en la Abatejo de Egmond.

Vera kaj li renkontiĝis dum UEA-kongreso antaŭ pli ol 40 jaroj. Nun ĝojigas ilin kvar genepoj. Ni kore gratulas lin kaj Vera.

Li postsekvis Adolf BURKHARDT kiel prezidanto de KELI, sed kiu postsekvos lin?...

Els VAN DIJK

### Funebra sciigo

Je la 15a de oktobro 2002 mortis en Delft s-ino T. van der Meulen-Bulthuis. Ŝi naskiĝis la 25an de aŭgusto 1910. Ŝi estis dumviva membro de KELI. En la pasinteco ŝi fidele partoprenis kongresojn sed jam antaŭ multaj jaroj ŝi eniris flegejon ĉar ŝi ne plu povis vivi sen prizorgado. Mi rememoras ŝin kiel virinon kiu ĉiam partoprenis niajn KUNE-kunvenojn.

Els VAN DIJK

Nia bulgara kaj ortodoksa frato Ĥristo DIMITROV sendis al ni tradukon el Bulgara ĵurnalo.

# APUD LA TOMBO DE SANKTA APOSTOLO ANDREO — UNUE VOKITA DE JESUO KRISTO

Kune kun la eniro de la tria jarmilo post Kristnasko 2001 la bulgara Patriarko Maksim kaj la Sankta Sinodo donis sian benon por ke sekvu pilgrimvojon de Sankta Andreo apud Nigra Marbordo, sur kies tero li unue predikis la Evangelion. Pere de tiu ĉi iniciato oni konstruos grandan krucan monumenton memorigante la jarojn 64 ĝis 68 post Kristo. Nun tiu ĉi loko estas nuna insulo „Sankta Elena" apud Burgas. La celo de tiu ĉi sankta pilgrimado al greka urbo Patra estas, ke la ortodoksianoj prenu sanktan oleon el la lucerno, kiu troviĝas antaŭ la kruco de Sankta Andreo, enterigita en tiu ĉi loko.

## KIU ESTIS SANKTA ANDREO?

El la Biblio ni scias, ke Sankta Andreo estas frato de Sankta Petro, nomita „unue vokita", ĉar li estis la unua, kiu postsekvis Kriston en Malgranda Azio–Anatolio kaj poste al Nigra Marbordo apud la rivero Dnepr, atingante la altaĵoj de Kiev. Li antaŭdiris, ke tie elkreskos multe da preĝejoj. Tiu ĉi antaŭdiro realiĝis ne post longe. Poste li revenis pere de sama vojo kaj direktiĝis sur la sama marborda vojo al antikva Elada kaj greka urbo Patra sur adriatikaj marbordoj. Lia prediko estis tiel forta, ke preskaŭ la tuta loĝantaro ekkredis je Jesuo Kristo. Inter ili ankaŭ la edzino de la regiona estro Egeat. Sankta Andreo kuracis ŝin de grava malsano. La religion kristanan akceptis ankaŭ la filizofo Stratokli, frato de la regiona estro. Intertempe Egeat estis en Romo. Reveninte li ĵetis la apostolon en malliberejon.

Dum la nokto la sanktulo malfermis pere de kruca signo la pordojn de la malliberejo, predikis inter la loĝantaro, plenumis la Sanktan Meson kaj konsekris Stratoklin al episkopa rango. Poste li revenis en la malliberejon kaj denove ŝlosis la pordojn pere de la sama krucsigno. Oni kondamnis lin sekvontage je krucigita morto — sur kruco en formo de litero X. Tiu ĉi kruco estas famkonata kiel „Andrea kruco" La tuta loĝantaro kunvenis amase kaj akre ribelis. Egeat ektimis kaj ordonis, ke Sankta Andreo estu malsuprenigita de la kruco. Sed S. Andreo ne akceptis tion, okazis kaj preĝis al Dio, por lasi lin tie kaj li ellasis lastan spiron sur la kruco. Tio okazis dum la epoko de Nero (64a–68a jaro post Kristo).

Nun en la greka urbo Patra troviĝas la preĝejo „Sankta Apostolo Andreo" en samnoma strato. Ĝi estas mirinda preĝejo kun arkitekturo arte farita, mozaiko kaj oro. Ĝuste tie estas metita la kruco, sur kiu la apostolo estis krucigita. Ankaŭ tie oni povas vidi sarkofagon kun aldonitaj al ĝi etaj figuretoj, metalaj, arĝente respegulantaj: manojn, krurojn, okulojn kaj aliajn korpopartojn, al kiuj la Sanktulo adresis sian kuraceblan preĝon, per kiu la malsanuloj resaniĝadis.

Tiu ĉi preĝejo estis konstruita komence de la 19a jarcento sur la sama loko, kie suferadis la apostolo antaŭ sia krucumo. Apud la preĝejo, kvazaŭ algluita estas malliberejo, kie la Apostolo estis kondamnita. Apude estas la poto kun kuracebla akvo en tiu ĉi sankta loko.

Nun bulgaraj kristanoj organizas pilgrimadon sur la ŝtupoj de Sankta Andreo, sur bulgara tero apud bulgara Nigra Marbordo.